

Angelum pacis

Brevier-Himno

Propraj tekstoj laŭ la kalendaro > la 29-an de septembro > Sanktaj ĉefanĝeloj Miĥaelo, Gabrielo kaj Rafaelo > vespera laŭdo

*Angelum pacis Michael ad istam,
Christe, demitti rogitamus aulam,
cuncta quo crebro veniente crescant
prospera nobis.*

*Angelus fortis Gabriel, ut hostem
pellat antiquum, volitet superne,
sæpius templum cupiens favendo
visere nostrum.*

*Angelus nobis medicum salutis
mitte de cælis Raphael, ut omnes
sanet ægrotos pariterque nostros
dirigat actus.*

*Christe, sanctorum decus angelorum,
adsit illorum chorus usque nobis,
ut simul tandem Triadi per ævum
carmina demus.*

Amen.

latina T: antaŭ 11-a jarcento

Miĥael, vervu por la Di-honoro.
Paco-anĝelo, pelu for malpacon.
La eklezion gardu, la savitajn,
kontraŭ malbono.

Gabriel diru, kion Di' ordonis.
Savo-heroldo, nin instruu kredi
kaj la misteron, kiun vi malkaŝis,
nove proklami.

Rafael, igu sanaj nin kadukajn,
maldolorigu, donu help-konsolon,
gvidu nin blindajn el la ter-obskuro
al paradizo.

Kristo, Vi ĝojo de l' anĝeloj sanktaj,
Vi hom-savanto, Reĝo de l' savitaj,
igu nin kanti, kaj kun ili laŭdi
la Triunuon.

Amen.

E: Bernhard Eichkorn kaj Albrecht Kronen-
berger 2003, laŭ la germana versio,
2009 en «Kantoj post ADORU» n-ro 6